

SCIENCA REVUO	El Vol. 21
de Internacia	
Scienca Asocio	n-ro 4/5 (84/85)
Esperantista	
(BEOGRAD, Jugoslavio)	5. 9. 1970.

DUFLANKA TRAKTADO PRI UZADO DE DIFINA ARTIKOLO

A. Vaitilavičius (Vilnius, Sovetunio)

Reĥoj al mia kontribuajo por reguligi uzadon de la artikolo en Esperanto (Scienca Revuo 20/2) montras, ke la demando estas aktuala.

S-ro E. Sonnenfeld (SR 20/3—4) grave kompletigis mian tezon pri uzendeco de »la« parolante pri objekto aŭ persono konata ne nur al parolanto aŭ skribanto, sed ankaŭ al aŭskultanto aŭ leganto. Ni citu la kompletigon: »la artikolo difina indikas ion jam al la aŭdanto aŭ leganto konatan aŭ ion, kio estos tuj aŭ baldaŭ (dum la parolado aŭ la legado) konata al li«.

Vere ni ĉiam uzas kaj devas uzi »la« en frazoj de sekvanta konstruicio: venis la tago, kiun mi atendis. La tago ne estis konata al la leganto, sed fariĝis tia tuj post tralego de la frazo. La konateco ĉi tie, kiel en ĉiuj aliaj kazoj de uzo de la artikolo, povas esti eĉ plej elementa, donanta nur minimuman karakterizon de la priparolata objekto. Tial mi taksas malprava listigon de similaj ekzemploj, donitaj en kontribuo de s-ro V. Setälä (SR 21/1; »... la fontojn, laŭ kiuj S. Luko verkis...«), en kategorion de frazoj, kie objekto estas nekonata. Ĉiuj (escepte unu) de tiu grupo de ekzemploj donas ian karakterizon de la priskribitaj objektoj aŭ personoj kaj tial ili fariĝas konataj al la leganto kaj devas havi la artikolon. En la lasta frazo de tiu grupo (Iam en la nekonata

pasinteco la homo komencis doni nomojn al objektoj) »pasinteco« kaj »homo« ne estas konataj (ankaŭ, se ni forstrekos la vorton »nekonata«!) kaj ne devas havi la artikolon, se ni uzos ĝin laŭ principoj, eksponitaj en mia supremenciita kontribuajo.

Tamen, laŭ mi, la konatiĝo »baldaŭ« dum (tuta!) parolado aŭ legado estas jam troa libero, kiu kondukus ree al ĥaoso. Tial ni devus precizigi la tezon, ke tiu konatigo devas limiĝi per la sama frazo. Do, la artikolon ni devus aldoni nur al tiuj objektoj aŭ personoj, kiuj estis iel ajn karakterizitaj en antaŭirantaj frazoj aŭ en la frazo, kie ili estas menciataj.

Malfacilaĵon faras la tria (laŭ E. Sonnenfeld) grupo de konataj objektoj, nome — io ĝenerale konata. Ĉi tie jam povas okazi konflikto inter eksponanto kaj leganto (aŭskultanto), ĉar pri la konateco arbitre juĝas nur la unua. Kaj la ĉefafero ĉi tie estas, kion prave substrekis E. Sonnenfeld, ĉu la alparolato konas la objekton. Tial la artikolon devus alpreni nur unikaj, certe al ĉiuj konataj objektoj. Ilia listo estas verŝajne tre malgranda: la tero, la mondo (kie ni vivas), la suno (kiu nin varmigas), la ĉielo, la luno (kiujn ni ĉiuj vidas). Tial mi preterlasas en »Konkludoj« indikon de tiu ĉi rara kazo en la komentario, aldonita al la »fundamenta« regulo. Eĉ pli logike estus trakti ĉiujn unikajojn kiel

proprajn nomojn (komparu ekz. luno kaj Neptuno), kiuj estas difinitaj per sia propra titolo kaj ne bezonas difinon per »la« (egale, ĉu konataj aŭ ne). Oni ne povas konsenti kun V. Setälä, ke iu ajn familia kaj geografia propra nomo estas konata al leganto.

»La homo ĝenerale« kaj similaj esprimoj estas nenio alia, sed kategorio de reprezentantoj de sia speco. Ŝajne mi sufiĉe argumentis laŭ ekzemploj el »Fundamento de Esperanto«, ke tiu kategorio de substantivoj ne devas akcepti la artikolon.

Ankaŭ pri ceteraj tezoj, eldiritaj en la kontribuajtoj de E. Sonnenfeld kaj V. Setälä, mi jam diris mian opinion en SR 20/2. Ne estas bezono ripeti la argumentojn. Sed mi devas diri, ke la kontraŭdiroj inter miaj tezoj kaj tiuj de aliaj aŭtoroj estas nur ŝajnaj, ĉar ni traktas la objekton el diferencaj flankoj. Nome, mi skribas pri tio, kiel, strebante regulecon kaj atentante »Fundamenton de Esperanto«, ni **devus uzi** la artikolon, kaj la aliaj aŭtoroj — kiel ĝi **estas uzata** laŭ tradicia maniero. Lastrilate ni devas agnoski veran meriton de s-ro V. Setälä, kiu sukcesis per unu frazo kodeksi tiujn komplikaĵojn, por kiuj K. Kalocsay kaj G. Waringhien bezonis multajn paraĝrafojn kun aldonoj kaj rimarkoj.

Sed restas la vero, ke tiu ĉi regulo*) neniel kontribuas al forigo de la ĥaosa uzado de la artikolo. Ja aludan signifon parolanto aŭ skribanto povas doni al io ajn kaj al iu ajn. Ankaŭ kompletigo per determinaj vortoj dependas tute de volo de eksponanto. La juĝo, ĉu tiu aŭ alia substantiva es-

*La difina artikolo estas uzenda, kiam vorto estas uzata en aluda signifo, en tiu senco, ke sen la kunteksto ĝi postulus kompletigon per determinaj vortoj por esprimi la celatan koncepton (Citaĵo el »Esperantologio« vol. 2, n-ro 2, 1961).

primo komplete aŭ ne komplete karakterizas celatan objekton, ankaŭ estas arbitra. Tion pruvas i.a. ankaŭ la ekzemploj de V. Setälä. Escepton faras konataj (laŭ principoj de mia propono) objektoj, ĉe kiuj en la donitaj ekzemploj la aŭtoro regule aldonas »la«, kvankam teorie li penas diskrediti la regulon.

Bedaŭrinde en la citaĵo de la regulo de V. Setälä dum retajpo estis forlasitaj kelkaj vortoj. Tamen mi konkludis pri la regulo ne laŭ falsa citaĵo, sed laŭ tuta originala artikolo en »Esperantologio«. Ankaŭ sen ajna pruvo estis presita alia aserto: ke mi ne komprenis la regulon. Similaj senbazaj eldiroj tute ne taŭgas inter sciencaj tezoj.

Eble iu riproĉos, ke en mia artikolo en SR 20/2 mi mem ne atentis la propran proponon pri uzado de »la«. Mi devas diri, ke la troaj artikoloj estis aldonitaj dum redaktado kaj tio ja estas plena rajto de la redaktanto, ĉar miaj tezoj estas nur propono, kiun oni povas atenti aŭ ne.

K o n k l u d o j

Kontraŭdiroj inter miaj tezoj pri uzado de difina artikolo kaj tiuj de aliaj aŭtoroj ekestis pro tio, ke ili traktas la demandon laŭ tradicia praktiko kaj mi penas trovi vojon al regula kaj unueca uzado surbaze de »Fundamento de Esperanto«.

Surbaze de rimarkoj de E. Sonnenfeld ni precizigu la komenton de la regulo de »Fundamento de Esperanto« (presita nigre) jene:

La artikolo »la« estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj al leganto aŭ aŭskultanto laŭ karakterizo en antaŭaj aŭ en la sama frazoj.